

Germana Esperantisto

Der Deutsche Esperantist

Oficiala Organo de
Germana Esperanto-Asocio (G. E. A.)
kaj de aliaj esperantistaj unuiĝoj

Aperas duonmonate en du alternantaj eldonoj:
Eldono A (Propagando) — Eldono B (Literaturo)



Offizielles Organ des
Deutschen Esperanto-Bundes E. V.
und anderer Esperantisten-Vereinigungen

Erscheint halbmonatlich in zwei abwechselnden Ausgaben:
Ausgabe A (Propaganda) — Ausgabe B (Literatur)

Abonprezo: por jaro 2.400 Sm. (Provabono por duonjaro, komen-
ciĝanta en januaro kaj julio, 1.200 Sm.). Ĉiu eldono aparte:
1.200 Sm. (0.600 Sm.). **Anoncoj:** Vidu tarifon sur la kovrilo

Bezugspreis: für ein Jahr 4.80 M (Probeabonnement für ein Halb-
jahr, beginnend im Januar und Juli, 2.40 M). Jede Ausgabe ein-
zeln: 2.40 M (1.20 M). **Anzeigen:** Siehe Tarif auf dem Umschlag

Alsenditajn artikolojn la redakcio laŭ bezono korektas. Nepresitajn manuskriptojn ni redonas nur, se oni aldonis postmarkon por la resendo

11^a Jaro N^o 11B (164)

Eldonejo kaj Redakcio: Dresden-A. 1, Struvestr. 40

Novembro 1914

Enhavo: Bonvolu atenti! — Antaŭ kaj post la „Deka“ —
Ĉirkaŭata de soldatoj, rabistoj kaj ribelantoj —
Nadzi, la turka fratino-flegistino — Internacia konflikto —
Rivero (Versaĵo) — Aforismoj — Diversaj komunikoj — Por-
lertuloj — Korekto — Anoncoj

Bonvolu atenti!

Bedaŭrinde ni devas komuniki al la abo-
nantoj de nia ĵurnalo „Germana Esperantisto“,
ke S-ro Friedrich Ellersiek en Berlin pro alia
okupado estas devigita, ĉesigi sian funkcion
kiel redaktoro de nia ĵurnalo.

Ĉiujn sendaĵojn por nia redakcio oni bon-
volu direkti nun al nia adreso en Dresden.

Ader & Borel G. m. b. H.

Antaŭ kaj post la „Deka“

Sub tiu ĉi titolo S-ro H. Bolingbroke Mudie en
„The British Esperantist“ (Septembro) faras tre legin-
dan raporton pri kongresaj okazintaĵoj. Ĉi sube ni
represas la raporton, kiu certe interesos niajn legantojn,
ankaŭ pro tio, ke ili ekscios, kiamaniere angla sami-
deano prijuĝas la militstaton.

La redakcio

Kia katastrofo! Anstataŭ la brila triumfo —
eĉ la plej brila ĝis nun en nia historio — nur
sanga makulo. Malgraŭ la dudeka jarcento, la
civilizacio kaj la religio — la fortoj de la infero
ankoraŭ kvazaŭtriumfas.

Almenaŭ kvincent fidelaj britaj esperan-
tistoj — esperantistoj laŭ la plena signifo de
tiu nomo — transiris el diversaj havenoj tiun
mar-kolon, kiu nun havas por ni ĉiuj signifon
multe pli gravan kaj ŝatatan.

Multaj por la unua fojo kuraĝas kontraŭ-
batali la supozitajn malfacilaĵojn de eksterlanda
vojaĝado, kuraĝigitaj de la favoraj spertoj de
siaj samideanaj kolegoj. La energia laborado

de la Kongresa Organiza Komitato streĉis ĉies
entuziasmon ĝis neantaŭvidita nivelo.

Mi kune kun ĉiuj aliaj senpacience atendis
la solenan malferman kunsidon, kie por unu plua
fojo kunvenos la „rondo familia“.

Sabatmatene mi renkontis ĉe la stacidomo
Victoria mian amikon S-ron Heldmann — tiu
membro de la Middlesex Konsilantaro, al kiu ni
ŝuldas la jam anoncitajn sukcesojn pri la enkon-
duko de Esperanto en publikajn lernejojn.

La esperantistoj plejparte uzis la Folkestone-
aŭ Dover-ŝipojn tiun tagon, kaj ni nur renkontis
ĉirkaŭ dudek inter Newhaven kaj Dieppe.

Varmega suno kaj bluega maro kreskigis
niajn esperojn kaj kiam, post iom longa haltado
en Dieppe, nia homplena vagonaro traveturis la
freŝeverdan, ridetantan francan landon, estis ne-
eble pensi pri malpaco kaj milito, sufero kaj
sango.

Nenio eksterordinara okazis, ĝis ni alprok-
simiĝis Parizon. Nur tri soldatojn ni vidis dum
la tuta veturado al la Parizaj antaŭurboj. Sed
ĉirkaŭ la sepa horo evidentiĝis, ke okazis — io!
Tamen nenion definitive ni eksciis ĝis la alveno en
Gare St. Lazare. Tie densa homamaso tute baris
por ni la kutiman elirejon. Tamen mi eltrovis
flankan pordeton, per kiu ni rapide atingis la
straton. Tial nur poste mi sciigis, ke tiu densa
amaso estis britoj, kiuj ekforflugas hejmen. Inter
ili estis miaj karaj gepatroj, kaj mi poste aŭdis,
ke ili renkontis kelkajn, kiuj veturis kun mi, kaj
instigis ilin tuj reveni, sen eliro el la stacidomo.

Ekster la stacidomo regis ĥaoso! Longe,
tre longe, ni atendis fiakron; sed fine forveturis
hotelen kun veturigisto ekscitiĝinta pro tio,
ke antaŭ unu horo oni proklamis la mobili-
zadon, kaj ke morgaŭ li devos iri al la belga
landlimo.

En la hotelo Windsor mi trovis generalon Sébert, S-rojn Bricard, Chaussegros, Rollet de l' Isle kaj Archdeacon, kaj vespermanĝis kun ili, antaŭ ol foriri al la Centra Oficejo por kunveno de la Organiza Komitato.

Ĉe tiu kunveno ni faris diversajn decidojn, kiujn mi ĉi tie resumos:

1. Malfermi la kongreson kiel anoncote dimanĉvespere kaj, se pli bonaj informoj ne estos ricevitaj, fermi la kongreson tuj poste.

2. Ke la prezidanto de la kongreso estu generalo Sébert.

3. Ke la Organiza Komitato laŭeble redonu monon al tiuj kongresanoj, kiuj jam postulis ĝin, sed ke oni ne redonu la monon por kongreskarto al la ceteraj kongresanoj.

4. Deklari, ke nenia plendo kontraŭ la Komitato pro tio, ke pli frue ne estis eble averti pri la ebla forlaso de la kongreso, estu pravigebla.

Ĉiuj suprenomitaĵaj rezolucioj estis unuanimaj.

Poste S-ro Warden afable akompanis min al la akceptejo.

De malproksime sur la fama Place Clichy forte brilis nia verda stelo. Kiom da centmiloj da homoj estus ĝin vidintaj dum normala kongreso, kiu scias? Kaj en la akceptejo mem nur la posedanto de la lampo de Aladin ne plenigis je mirego kaj ĝojo. Vasta, bele ornamita halo, kapabla por enhavi la tutan 3800 kongresanaron, kun la grandlitera devizo: „En la mondon venis nova sento.“ Kia ironio! Vere tiuj literoj devus esti sangkoloraj anstataŭ oraj. Neniam mi forgesos tiun belan akceptejon.*) Tamen mi eniris la grandan halon por malpli ol kvaronminuto! Ĉar ekstere en la luksa antaŭĉambro kolektigis samideanaro, plejparte brita. Multaj, kiuj nur havis anglan ormonon, malsatis jam de la mateno, kaj ĉiuj atendis informojn. Tuj mi saltis sur seĝon kaj anoncis, ke laŭ la nunaj informoj estis decidite malfermi la kongreson morgaŭ vespere, kaj ke mi mem intencas ĉeesti. Al ĉiuj mi konsilis trankviliĝon kaj fruan levigon post komforta dormado, por frumatene studi la journalojn kaj ekscii, kio estas farinda. Dum la komitatkunveno oni certigis al mi, ke la akceptejo restos malfermita ĝis noktmezo. Mi do tuj forkuris — ĉar fiakroj ne plu estis troveblaj — por eltrovi miajn gepatrojn. Ili loĝis ne malproksime, sed pro la granda ekscitigo sur la stratoj kaj la tuta manko de policianoj mi devis multe serĉi la vojon. Fine mi trovis la ĉarman domon, kie S-ino Langlet plej afable priklopodas siajn gastojn. Tie je mia mirego mi trovis, ke laŭ informo ricevita ĉe la brita ambasadorejo ĉirkaŭ la sesa horo miaj gepatroj, F-ino Lawrence

kun la blinda F-ino Morrison, F-ino Roche kaj la F-inoj-Wynter jam foriris — sen grandaj pakajoj, sed nur kun valizetoj amasigitaj sur puŝveturilon, kiun veturigis S-ro Langlet kaj mia patro!

La afableco de S-ino Langlet dum tiu krizo estis vere grandega, kaj ni havis efektive bonŝancon pro tio, ke la francaj samideanoj trovis por ili tian samideanan domon ĉe 66, rue Boursault, kiun mi varme rekomendas al ĉiuj, kiuj iam post la milito deziras reviziti Parizon.

Tiu informo kompreneble tute ŝanĝis la situacion, kaj mi rekuris akceptejen ĉirkaŭ la dek-unua horo nur por trovi ŝlositajn pordojn. Kion fari!

Reveninte al la hotelo, S-ro Heldmann rakontas, ke li kun S-ro Archdeacon sukcesis intervui la ĉefon ĉe la stacidomo kaj eltrovis, ke morgaŭ matene la kutima vagonaro funkcios al Dieppe, sed ke poste ĉio haltigos, por ke ĉies patrino inter 18—42 alveturu batalejon.

Tion ili anoncis en la akceptejo, kaj mi do trankviliĝis konsciante, ke la franca registaro certe faros ĉiujn klopodojn por senigi sin de miloj da britaj buŝoj.

Kune kun S-ro Adams ni vizitis la stacidomon por vidi, kio estas, kaj trovis nekredoblan konfuzon. Post multaj klopodoj kaj oftaj neadoj ni venis al la konkludo, ke omnibusa vagonaro forveturos al Rouen kvindek minutojn post noktmezo. Ni do revenis al la hotelo kaj trovis, ke ĉiuj kelneroj jam estas for. La mastro mem funkciigis la lifton. Ho! Kiom blanka kaj komforta aspektis la neuzita lito, kaj kian timigan bildon prezentis al mi mia spegulo: kolumo tute senameligita pro ŝvito! La blinda S-ro Merrick jam enlitigis, sed S-ro Adams avertis lin kaj sekvis nin al la stacidomo, kie ni diligente penadis eltrovi, ĉu la vagonaro funkcios aŭ ne, kaj de kiu perono. Meze de tiaj klopodoj plenmire mi ekvidis stelaron, apartenantan al kompanio da ĵusalvenintoj! Tuj mi alkuris al ili — speciale mi memoras S-rojn Hyde kaj Merchant — kaj diris, ke la kongreso ne povas okazi, ke Parizo estas neebla, kaj ke mi mem foriras. Ili miregis, sed estante lacaj kaj malsataj kaj neniel komprenante la signifon de plena mobilizado en kontinenta lando, ili forveturis al la elektita hotelo kaj havis aventurojn, pri kiuj, mi esperas, ili mem raportos al vi.

Subite vagonaro aperis, kaj la lokomotivisto esprimis la intencon ĝin veturigi al Rouen laŭeble. Tuj ni eniris, tute ne montrinte biletojn; mi ekskursis al la restoracio, kie mi aĉetis la tri lastajn panpecojn, la du lastajn pecojn da ŝinko, tri orangojn kaj botelegon da malbonega akvaĉo. Ektrumpetis kontrolisto, ekruligis vagonaro, kaj colon post colo ni alproksimiĝis tiun karan hejmlandon tiom proksiman, tamen tiom malproksimegan.

*) Vidu la noton de S-ro W. M. Page ĉe la fino de la raporto.

Post kvinhora malrapidegirado ni trovis nin en Rouen meze de soldatoj, kiuj, kune kun la tuta franca popolo, avide demandis: „Kion faros la angloj?“ „Havu fidon!“ diris ni. „La angloj neniel vin forlasos!“ Kaj manpremoj: kia feliĉo!

Vere, se Anglujo ne estus farinta sian devon en tiu krizo; mi kredas, ke neniu brito estus tolerata dum jaroj sur la kontinento.

Grandsurprize ni trovis, ke omnibusa vagonaro al Dieppe forlasos Rouen post tri horoj. Do ni vizitis la Rouenajn preĝejojn ktp. kaj prenis bonegan kafon ĉe butikoj, kie ni ricevis la akcepton, kiun niaj francaj amikoj speciale rezervas por la angloj.

Neniu postulis biletojn! Mi aŭdis pri du angloj, kiuj veturis de Marseilles ĝis Calais, tute ne montrinte bileton! Do tiu, kiu volas senpage ekskursi sur la kontinento, elektu epokon de mobilizado!

En Dieppe vaporŝipo estis ĉe la bordo, sed la kapitano ne sciis, ĉu li transveturos al Anglujo. Do S-roj Adams kaj Merrick gardis nian valizaron inter ĉiam pligrandiganta amaso da ekscititaj ekskursanoj, kiuj revenas de Normandujo, dum S-ro Heldmann kaj mi ĝuis la plej agrablan naĝadon de nia vivo.

Baldaŭ ni revenis, por trovi la amikojn jam sur la ŝipo.

La ŝipo kutime portas 600 vojaĝantojn, sed oni informis min, ke ne malpli ol 1500 surŝipiĝis. Estis tre maltrankvile, la ŝaŭmo baptis la tutan ferdekon, kaj preskaŭ ĉiu vomadis super sia najbaro! Kia vojaĝo! Sur la kajo en Dieppe ni ekaŭdis, ke tiu „Amiko de la Paco“ deklaris la militon kontraŭ Rusujo,*) kaj ni eksciis, ke la plej granda krimo de la historio ja plenumiĝis, kaj ke riveroj da sango devos elflui, antaŭ ol la justeco kaj homamo denove povos venki la potencojn de l' infero.

Tia estis la Dekka Kongreso — tiu plej brila triumfo, pri kiu revis nia ĉeforganizinto Carlo Bourlet. Mi ĝojas, ke li jam mortis; alie tiu sortofrapo estus lin mortiginta pro rompita koro.

La sekvanta tago estis banklibertago kaj, dank' al afabla telefonita penso de S-ino Holmes, kiu trafis min ankoraŭ en la lando de la sonĝoj — mi vekiĝis kaj trovis, ke la antaŭaj aventuroj ne estis timiga inkubo, sed efektive veraj. Kaj ke nia ĉefurbo estas plena je malfeliĉaj rifuĝintoj de Esperantujo. Tamen nia lando estas sen limoj kaj, per la helpo de la tranĉilo de skota samideano, ni malfermis la fenestron ĉe B. E. A., tragrimpis kaj malfermis la legoĉambron, kiu subite pleniĝis je lacaj rifuĝintoj, kiuj senĉese raportis spertojn; ĉiu el ili superis la aliajn. Internacia korpuso al militis butikojn

*) Ĉar Rusujo devigis Germanujon, mobilizinte jam antaŭe sian tutan armeon kontraŭ Germanujo kaj Aŭstrio-Hungarujo.

La redakcio

kaj revenis kun amaso da manĝaĵoj, kaj B. E. A. proponis sian gastamon al la plej unika kunveno en la brita historio de nia movado. Mi esprimis la esperon, ke eble ni povos kune viziti iun marbanurbon. Tamen ĉiuj sentis, ke dum krizo „hejmo, dolĉa hejmo“ estas la tagordo.

Mi ankaŭ faris personan deklaron pri la motivoj, kiuj kaŭzis mian fruan revenon, anstataŭ agi laŭ mia kutimo kaj forlasi lastule la danĝerzonon. Mi tre bedaŭris mian malfeliĉan kaj trokonfidoplenan anoncon en la akceptejo. La ĉeestantoj unuanime subtenis la rezolucion proponitan de S-ro Rhodes Marriott. . . .

Dum la tuta semajno rifuĝintoj alvenadis ĉe B. E. A., kaj ni tre ĝojas, ke la centra situacio de nia ĉefloko helpis ilin sin orienti, interŝanĝi aventurojn kaj iom post iom dise aŭ are reverturi hejmen por retrovi la trankvilon kaj pacon: la solaj kuraciloj por tia sperto.

La konsilantaro de B. E. A. voĉdonis du rezoluciojn, kiujn vi trovos aliloke. Unu estas por danki ĉiun el vi, kiu tiel fervore provis ĉeesti Esperantan manifestacion en epoko, kiu tagon post tago donis kreskantan dubon. Se nur, anstataŭ la milito, Aŭstrujo estus anoncinta, ke la bombardado de Belgrad sufiĉas por kontentigi ĝian honoron — kaj multaj tion atendis — kiom fervore ni estus kantintaj nian belan Espero! Kia triumfo por nia movado!

Sed la vivo estas justa. Tiu, kiu celas grandan sukceson, ĉiam riskas egale grandan malsukceson. Se en la nuna momento ni trovas, ke malfacile estas pensi pri Esperanto kaj pri ĉio, kion ĝi signifas, ni ne forgesu, ke neeviteble post la fino — ĝi estu rapidega — de tiu ĉi unika krizaro la civilizita mondo fariĝos furioze netolerebla je regnestroj, kiuj, kontraŭ la volo de la popolo, povos ŝanĝi prosperplenan landon en buĉejon; kaj ni forte konsciu, ke tiam nia movado envenos en sian regnon de homa interlaborado sen landlimoj kaj intrigoj, nur celante la bonon de la homaro.

H. Bolingbroke Mudie

P. S. — Malgraŭ espero mi ankoraŭ ne ricevis informon pri la kara Majstro. Lia vagonaro estis haltigita en Germanujo, kaj laŭfame la rusaj vojaĝantoj estis forsendataj al difinitaj gardejoj. Espereble nenio malbona okazos, kaj nia kara Doktoro baldaŭ revenos sana kaj nevundita aŭ al sia hejmo, aŭ al unu el la centroj de Esperantujo, kiel Anglujo, kie li ricevos ampleksan akcepton ĉe ni ĉiuj.

P. S. S. — Dro Zamenhof revenis al Varsovio nedifektita.

Noto. Se oni iam dubis pri la taŭgeco de la Gaumont-Palaco por Esperanto-kongreso, tiu dubo ne longe ekzistis post la unua ekvido de la impona konstruaĵo sur la Place Clichy. Jen super ĝia alta

tegmento flirtis kune du grandaj standardoj — la trikoloraĵo de Francujo kaj la verdaĵo de Esperantujo. Sur la fasado grandlitere estis arke aranĝita la vorto „Esperanto“ kaj grupoj da flagoj ankaŭ troviĝis tie. Trapasante la enirejon, oni vidis en la vestiblo la infirmejon, kie sur alta pupitro sidis afabla sinjoro, kiu direktis la enirintojn al la akceptejo ĉe la malantaŭa parto de la konstruaĵo. Por atingi la akceptejon oni devis trapasi vastan koridoron, kiu ĉirkaŭis la dekstran flankon de la kongresĉambrego.

Ĉe la flankoj de tiu ĉi koridoro diversaj budoj stariĝis, kie oni ekspoziciis la eldonaĵojn de diversaj firmoj. Presa Esperantista Societo, Hachette & K-io., Ader & Borel, Cuzon ktp., kaj oni vendis poŝtkartojn, librojn kaj esperantaĵojn. Oni ankaŭ vidis belajn parolejojn kun komfortaj brakseĝoj, sofoj, ktp., kie la frue alvenintaj kongresanoj gaje babiladis aŭ serioze diskutis la minacantajn dirojn pri milito. La akceptejo estis tre vasta ĉambrego, meze de kiu estis kontoro, kie oni vidis la amasigitajn kovertojn de la 3700 kongresanoj, kaj tie ĉi aro da afablaj sinjorinoj interŝanĝis la kovertojn por la provizora kongreskarto.

En la koverto la kongresano trovis sian kongreskarton, sian insignon — belan verdan silkan rubandon kun pendanta medalo, sur kiu estis reliefe stampita la desegnaĵo de S-ro Agache jam vidita sur la kongresafiŝo kaj marko — manlibro de Parizo kun tre utila plano de la urbego, programon de la kunvenoj, kaj aliajn dokumentojn.

En la vasta koridoro, kiu ĉirkaŭis la alian flankon de la kongresĉambrego estis aliaj budoj, speciale dediĉitaj al literaturo por blinduloj, ruĝa kruzo, ktp. Ankaŭ troviĝis multaj distraĵoj, aparatoj, per kiuj oni povus provi siajn kapablojn, post meto de monero tra truo.

Oni estis forte impresita per la unua rigardo de la ĉambrego difinita por la kunvenoj de la kongreso. En ĝi 6500 personoj povus trovi sidlokojn. Antaŭ la estrado estis vera ĝardeno de palmoj kaj floroj, kaj ĉirkaŭe vidiĝis standardoj kaj blazonoj. Ĉio estis preta por la plej granda esperantista kongreso iam okazinta.

W. M. Page

Ĉirkaŭata de soldatoj, rabistoj kaj ribelantoj

Rememoroj el la nuna tempo

Belega mateno nin logis promenadi en la ĝardeno. La suno speguliĝis en la rosgutoj, kiuj, diamantsimilaj, kuŝis sur floroj kaj folioj — inter la arboj gaje kantis la birdoj — papilioj flirtis de floro al floro, kies dolĉaj bonodoroj plenigis la aeron. La tuta mondo ŝajnis plenigita de kontenteco kaj paco, kaj por momento ni forgesis la militon, kiu estis trapasanta kaj pereanta nian belan landon Meksiko. — Sed nur momenton ni povis revii, ĉar baldaŭ eniris mia nevo, sciiganta al ni malbonajn novaĵojn.

„Amiko el S. ĵus komunikis al mi, ke ĉiuj soldatoj devas forlasi la najbarajn lokojn Z. kaj

S., kaj tiam ni restos tute sen helpo por kontraŭstari la atakojn de rabistoj kaj viraĉoj. Mi ne kuraĝas lasi vin pli longe en ĉi tiu soleco dum la ĉiamaj ekscitoj, enpaku tuj viajn aĵojn, ĉar morgaŭ matene ni devas forlasi nian hejmon.“

Ho, kia malbela vekiĝo el niaj dolĉaj revoj! La 8an de Aŭgusto frumatene ni estis pretaj, sed pro diversaj malhelpaĵoj ni povis forraĵdi nur je la 8a antaŭtagmeze. Ne eble estis trovi tie ĉi pli ol kvar armitajn rajdservistojn, sed ni esperis renkonti aliajn survoje. Ili estis revenontaj en tiu tago el S. J., kaj ni decidis, ke ili reiru tien kune kun ni.

Post unuhora rajdado ni ilin renkontis, sed homoj kaj bestoj estis elĉerpitaj kaj devis iom ripozi, antaŭ ol ili kuniĝis kun ni. Je la 10a matene ni atingis T., la lastan urbeton inter nia hejmo kaj S. J., la fervojstacio. Enrajdante en T., ni vidis pitoreskan spektaklon: la tuta granda Plaza (publika ĝardeno) estis plenigita de soldatoj matenmanĝantaj, kaj preskaŭ ne eble estis trarajdi la amason. La estro tuj venis por saluti nin, kaj li proponis, rajdi sub lia protekto — tamen pli bone estus atendi, ĝis la infanterio, ĝuste manĝanta, estus foririnta; la infanteriistoj marŝis jam la tutan nokton, tial ili povus iri nur tre malrapide. Ni eniris domon de amikino kaj de tie rigardis la preterpason de la soldatoj. Ho, kia malgajiga vidaĵo! Multegaj el la malfeliĉuloj apenaŭ havis forton por antaŭeniri! Iliaj sandaloj, disŝiritaj per la ŝtonegaj vojoj, ne plu ŝirmis la lacajn piedojn, la blanka vestaĵo estis malpura kaj makulita de l' tero, sur kiu ili kuŝis dum la nokto — la brunigintaj vizaĝoj montris postsignojn de suferoj kaj malsato — kaj tiaj malfeliĉuloj estis defendontaj la patrujon! Sed ne nur viroj preterpasis — kune kun ili venis *las soldadas*, virinoj akompanantaj ilin kiel provizistinoj kaj kuiristinoj. Ofte ni vidis soldatinon kun infaneto alligita al ŝia dorso, dum en la manoj ŝi tenis korbbon, plenigitan per manĝaĵoj kaj kuiriloj. Aliaj soldatinoj rajdis kune kun infano sur azeno; aŭ du-tri etuloj estis alligitaj sur tia besto, ridantaj pro ĝojo aŭ kriegantaj pro timo. Mi ne scias, kiom da tiaj soldatinoj kaj infanetoj preterpasis, sed almenaŭ estis kelkaj centoj. Kvin malsanaj soldatoj sur brakportiloj faris la vojon sur la ŝultroj de siaj kamaradoj. Neniu povas imagi, kiel mizera, malgajiga aspekto ĉio ĉi estis. Krom sia laca korpo ĉiu soldato portis pafilon kaj unu-tri kartoĉuĵojn, ĉiu enhavanta 50—75 kartoĉojn en leda ujo, kiuj certe pezis multege.

Fine ĉiuj preterpasis, kaj ni preparis nin, por sekvi ilin. Horo post horo pasis dum malrapida rajdado, ĝis ni preterpasis la plej danĝerajn lokojn, kie la densaj arbaroj donis bonan kaŝejon al rabistoj kaj ribelantoj. Kiam ni atingis la ĉefstron kun la kavalerio, ili ĵus haltis por

mallaciĝi; sed ni decidis antaŭenrajdi solaj, por alveni en S. J. antaŭ noktiĝo, tial ni nun rapidigis la rajdadon.

Sen aventuro ni proksimiĝis la lastan danĝeran densejon de abiaro, kiam antaŭrajdanto sciigis al ni, ke en la apuda intermontaĵo kaŝiĝas banditoj. Ni ĵus estis pasintaj la pli grandan altaĵon de 12200 futoj kaj plirapidigis la rajdadon, por baldaŭ eliri el la densejo, kaj feliĉe ni atingis tiam malgrandan *jacal*'on (fidometon), kies kvar flankoj konsistis el traboj, trunkoj kaj branĉetoj sub malalta tegmento. Fenestroj kaj pordoj estis anstataŭitaj per truoj, tra kiuj la vento gaje fajfadis. Antaŭ la kabano staris diversaj viroj kune kun ĉevaloj; sed senhalte ni preterrajdis, ĉar jam komencis noktiĝi, kaj ankoraŭ longan horon ni devis rajdi, ĝis S. J., se ni volis atingi T. la saman nokton. Unu el la rajdservistoj estis antaŭsendita, por mendi aŭtomobilon el T.

Apenaŭ ni estis preterpasintaj la lokaĉon, kiam postkuris nin viro, faranta signojn, por paroli al ni, kaj li kriis: „Ne eble estas, eniri S. J. — de postagmezo ĝi estas forlasita de l' soldatoj, kaj nun tie regas ribelantoj; oni ankoraŭ ne scias, kiuj el ili.“

Kion do fari? Ne eble restis antaŭeniri, nek returnenrajdi — ni devis atendi la revenon de nia sendito. Kvar sinjoroj kune kun ĉevaloj kaj servistoj jam estis tie, forkurintaj el alia loko, por atingi Meksikurbon, sed ne eble estis, fari tion. Ni saltis de la ĉevaloj kaj eniris la domaĉon, kies tegmento estis tiel malalta, ke ni devis klini la kapojn por ne kunpuŝiĝi kun traboj. Trunko antaŭ la enirejo anstataŭis la sofon, kaj tie amikino kaj mi sidiĝis, dum la sinjoroj preparolis la situacion. La *jacal* konsistis el du lokoj, dividitaj per travidebla branĉmuro, kaj stablo por bestaro. La loĝantoj estis tre malriĉaj, sed volonte nin akceptis kaj eĉ ellasis la kapridaron, por doni la bestojn al la ĉevaloj kaj servistoj. La domplanko estis tero, kaj en la mezo kelkaj ŝtonoj formis fajrujon; tie bolis fazioloj, kaj virino faris *tortillas* (maizkuketoj, kiuj anstataŭas panon). Feliĉe estis sufiĉaj, por ke niaj servistoj manĝu, sed por la malfeliĉaj bestoj estis nur iomete da herbo. La sinjoroj konkludis, ke plej bone estus, reiri hejmen, ĉar por kelkaj tagoj estis ne eble, eniri S. J., kaj eĉ tiam ni verŝajne perdus niajn ĉevalojn kaj pakajojn. Krom tio, tie ĉi ne estis manĝaĵoj, nek por ni, nek por la ĉevaloj. Sed unue ni devis atendi la alvenon de la aliaj servistoj kaj la revenon de Jesuo, la rajdservisto, kiu enrajdis S. J. Ni treege timis, ke oni malliberigos lin aŭ almenaŭ forprenos lian ĉevalon. Ĝis nun mi tre bone eltenis la lacigejon kaj ekscitegojn, kvankam mi manĝis nenion alian ol pecetojn da ĉokolado kaj nukspolvon, sed nun subite mi svenis du fojojn, tamen baldaŭ rekonsciigis.

Ho, kia ĝojo! Galope nun revenis Jesuo el S. J. Li eniris nur iomete, kaj vidinte la staton, li tuj rajdis reen. Laŭ lia diro regas granda konfuzo kaj malordo en la stratoj, malebligante nian eniron tie por kelkaj tagoj. Preskaŭ samtempe alvenis ankaŭ la servistoj, kiujn ni renkontis survoje, kaj nun ni formis kavalkadon el 16 ĉevaloj, tro malgrandan, por riski la antaŭenrajdadon al S. J. Ni decidis do, kuŝiĝi ĝis frumatene kaj tiam returnenrajdi al nia hejmo. Lito kompreneble ne ekzistis, sed la virino alportis al ni maldikan maton. Kuseno ne estis konata; sed estis bonŝance, ke tie, kie kuŝos la kapoj, troviĝis trabo, kaj duobligante niajn feltajn rajdĉapelojn super ĝi, ni eltrovis kusenon, kvankam ne tiel molan kiel lanugan! La ĉi-tiea altaĵo havis pli ol 11000 futojn, kaj frumatene malvarmiĝas treege, tial ni povis restadi nur kelkajn horojn.

Dormi ni ne povis; kvankam estis farita fajro (el verdaj branĉetoj) sur la sojlo, meze de l' „ĉambreto“, por sekigi la *serape* (lanaj kovriloj) de la sinjoroj, estis tre malvarme; la fumo disvastiĝis ĉien, antaŭ ĝi eliris tra la fendoj kaj truoj. Amikino kaj mi kuŝis en angulo, mia nevo sidis apud la pordo, por kontroli la enirejon, kvar sinjoroj kuŝis ĉe la flanko kontraŭ ni, kaj tie lokiĝis poste ankaŭ la militestro kaj liaj oficiroj! Vere, sufiĉe da personoj por tia kesteto de ĉambro! — Je la deka vespere aŭdiĝis laŭta bruado, kaj nun alvenis la militestro kune kun la kavalerio. Tuj la apuda ejo pleniĝis de oficiroj, soldatoj, soldatinoj kaj kriegantaj infanoj. Ĉiu postulis manĝaĵon; sed ne grenero estis trovebla, eĉ ne unu akvoguto restis en la akvujo. Ne eble estis, alporti ĝin de l' malproksima rivereto en tia malhela nokto, se oni ne volis sin elmeti al renkonto de malbonuloj.

Dum la tuta tempo pluvetis, kaj la fulmoj brilegis tra la fenestraj truoj; kaj nun pluvegis — la virinoj babiladis — la malsataj infanoj ploradis — la ĉevaloj alligitaj al fosto piedfrapis la *jacal*-flankojn, dum *Tlaloc* (Tlalok), la azteka akvo-dio, kiu prefere loĝis en tiuj altaĵoj, elverŝis sian tutan akvoprovizon sur la teron. Sed ĉio havas finon; post mallonga tempo ĉesis la fulmotondro, el la nuboj eliris la hela luno kaj la ŝteloj ree brilis. Jam estis noktmezo, kaj el ĉiuj anguloj komenciĝis ronkado — ĉiu ronke kantis laŭ sia volo kaj povo, sed la dormemaj, nemuzikemaj aŭskultantoj suferis inferturmentojn, feliĉe ne longtempe, ĉar je la unua ni jam preparis la forrajdadon.

Malfacila afero! La fajro estingiĝis, malhelo regis ĉie en la *jacal*, kaj nur ekbruligante alumetojn — eĉ ne sebkandelo troviĝis tie — ni povis kunmeti niajn kovrilojn ktp. La alia ejo estis tiel plenigita per dikaj kunvolvaĵoj (personoj tute envolvitaj en siaj kovriloj, ke estis ne eble, vidi

kapon aŭ piedojn), ke nur gvidata de mia nevo mi povis trapasi, ne faletante aŭ piedpremante ilin. Ankaŭ ekstere trovis sin tiaj kunpremigitaj kunvolvaĵoj kaj ĉevaloj, preskaŭ oni bezonis fadenon de Ariadne, por trovi eliron el tiu labirinto.

Ho kia ĝojo, kiam denove ni enspiris la puran, freŝan montaeron! Kvankam ni nek manĝis nek dormis, ni ne sentis nin malfortaj. La luno heligis la tutan vojon, kaj tra la arbopintoj vidiĝis la neĝkovrita vulkano, en majesta kvieteco malsuprenrigardanta sur la eternan malpacon de l' pigmea homaro.

Por kontraŭstari la efikon de la 12 200-futa altaĵo, kiu nun baldaŭ atingos, ni prenis sanigilon el nukso; ĉi tio kaj pecetoj da ĉokolado estis la nura manĝaĵo ĝis ni alvenis en nia hejmo.

Baldaŭ aperis duope, kvarope kaj multope la infanteriistoj, kiuj ne povis kuniĝi kun la kavalerio pli frue, lacaj, malsataj, malsekigitaj kaj frostremantaj, sekve de la tranoktado en la arbaro dum la forta fulmotondro kaj pro la kruela malvarmego. Se ilia aspekto hieraŭ estis malgajiga, ĝi nun estis vere kortuŝanta. Ĉiuj nin rigardis scivoleme, sed ni ne kuraĝis sciigi al ili la malagrablan situacion, kiu atendis ilin. La soldataro troviĝis en kaptilo: antaŭeniri al S. J. ili ne plu povis, ĉar de tie la federala garnizono jam estis forpelita kaj anstataŭita, per kiu, tion oni ankoraŭ ne sciis; returneniri estis ne eble, ĉar ili estis vokitaj al la ĉefurbo; restadi en Cruz Colorada estis ankaŭ ne eble pro manko de manĝaĵoj por homoj kaj bestoj. Nur pli malfrue ni aŭdis, ke la estro sin eltiris el tiu dilemo, riskante ĉirkaŭiri la vulkanon kaj eniri alian urbeton, kiu eble ankaŭ troviĝis en manoj de kontraŭuloj. Poste ni ne plu aŭdis ion pri niaj akompanantoj dum unu tago. Kiam fine, post malrapida, longa rajdado ni alvenis en T. Je la deka antaŭtagmeze, oni tie sciigis al ni, ke ribelantoj aŭ rabistoj estis anoncintaj en A., malgranda urbeto proksime de nia hejmo. Ni antaŭsendis rajdanton, por sciigi nian revenon, kaj sen ripozo ni tuj daŭrigis nian rajdadon. Ĝis tie mi bone eltenis la longan rajdadon, ĉiam atendante la atakon de rabistoj aŭ krimuloj, kaŝitaj en la densa, izolita arbaro, sed la lasta horo, en kiu ni estis elmetitaj al danĝera renkonto kun malamikoj, ŝajnis al mi pli longa, ol la tuta tago. Trarajdante la urbeton A., ni vidis multajn personojn en la stratoj. Ĉie regis ekscitoj kaŭze de l' sciigo, ke ribelantoj (kiuj ili estis, oni ne sciis), proksimiĝos. Ni rapide pluenrajdis, por atingi nian hejmon antaŭ la alveno de l' ribelantoj.

Je tagmezo ni estis hejme, kaj je la tria posttagmeze alvenis la unua bando de malamikoj. Anstataŭ ripozi, oni tuj devis kaŝi kofron, valizon kaj precipe la ĉevalojn. Ĉiuj pordoj kaj fenestroj estis fermataj per lignaj kovriloj kaj pezaj feraj

stangoj — la duan nokton ni ne povis senvestigi nin, ĉar ĉiumomente niaj spionoj aŭ esplorantoj nin povis averti pri la alveno de bandoj, kaj tiam ni devus eniri preparitan kaŝejon. Dufoje en la sama vespero oni laŭte pugnofrapis la feran pordon, kiu fermas la eniron al la korto kaj domo. Kiam neniu respondis, la viraĉoj foriris al nia oficejo. Tie ilin atendis la oficistoj, kiuj, por eviti pli grandan danĝeron, devis doni al ili la postulitan monon.

Ne eble estas, priskribi ĉion, kion ni travivis en tiu monato. Ni forrajdis la 8an, revenis la 9an, kaj dum la mallonga tempo de unu semajno ses diversaj bandoj de ribelantoj aŭ rabistoj (tre ofte oni ne scias, kio ili estis) alvenis ĉe ni. Kelkaj konsistis nur el malmultaj viraĉoj, sed aliaj el 90 kaj eĉ 250 bone armitaj viroj. Ĉiuj demandis pri pafiloj, ĉevaloj kaj mono (la monon ili volis nur pruntepreni — laŭ ilia diro), kaj la samtempe petitan kvitancon ili subskribis (se ili povis skribi) per nomo aŭ krucetoj kaj per la vortoj *Ley y Justicia* (leĝo kaj justeco!). Tiu ĉi justeco certe nuntempe havas duoblan ligajon sur la okuloj, por ne vidi la ofendojn kaj krimojn faritajn en ĝia nomo!

Neniu povas imagi, kiom da ekscitoj ni ĝis nun ankoraŭ eltenis. Hodiaŭ, la 8an de Septembro, oni atendas la trapason de S., kiu estas nomita guberniestro en la ŝtato G. Hieraŭ jam venis parto de liaj bandoj, multaj el la indianoj, nuraj sovaĝuloj, kaj tuj kiam ili ree estas en siaj hejmoj, ni esperas pacon kaj ne plu ĉiutagajn ekscitojn. Ho ve, apenaŭ mi skribis ĉi tion, mi aŭdas krion: Fermu, fermu! jam venas bandoj en nia direkto — — —

Ĉiuj kuris por fermi pordojn kaj fenestrojn — sed dank' al Dio, la bandoj elektis alian vojon kaj jam malaperis. Volu Dio, ke estis la lasta! — —

En malhela, pluva nokto mia nevo kune kun amiko kaj servistoj rajdis sekrete tra la senvojaj montoj, por savi niajn ĉevalojn, ĉar perfidulo diris al la bando de A., ke la ĉevaloj estis kaŝitaj tie ĉi. (Antaŭ du jaroj la *Zapatistas* jam ŝtelis niajn 6 belegajn tute malsovaĝajn ĉevalojn.) La du sinjoroj bone atingis S. kaj de tie rajdis kun *Carrancista* eskorto al T. La estro de la nuna registaro promesis ĉiun eblan protekton al ni. Ĉiuj atendas baldaŭan pacrevenon — nur la rabistoj ne, ĉar estas pli facila metio rabi, ol kamplabori.

Mi ĝenerale parolis nur pri ribelantoj, sed ili estis *Zapatistas*, *Salvadistas*, *Sanchistas* ktp. — preskaŭ ĉiu bando apartenis al alia „ista“.

De post Carranza fariĝis ĉefestro, ĝenerala migrado trapasas nian ŝtaton, aŭ por kuniĝi kun Carrancistaj trupoj aŭ por redoni ĉevalojn kaj pafilojn al la estraro — la sola maniero por eviti la rabon kaj mortigon.

Mi ne parolas pri niaj monperdoj, almenaŭ neniŭ el nia familio, nek oficistoj nek laboristoj estis mortigataj, dank' al Dio! Junulino eble ne estus suferinta tiel, kiel mi, maljunulino de 74jaroj!

Illamateuctli

Nadzi,

la turka fratino-flegistino

Vera okazintaĵo sur la batalkampo

De J. Kantoroviĉ

Bela, dolĉa knabino kun ronda vizaĝeto, helruĝaj vangetoj, rekta, iomete pinta marmorkolora nazeto kaj grandaj, karbonigraj, brilaj okuloj; kaj ŝia hararo — vere kovronigraj, longaj silkfadenoj, plekteblaj en longajn harligojn, taŭgajn por entuziasmigi plej grandan heroon. Kaj kiam ŝi disigas ilin, kiam ŝi diskombas ilin en la kaŝita ĉambreto kun fermitaj kaj ŝirmilkovritaj fenestroj, — tiam ili vere kovras ŝian tutan korpon ĝis la talio.

La silkecaj fadenoj — nur du-tri el ili mi vidis, kiam ili elŝteliĝis sur la blankan glatan frunton kaj atingis, trans la helruĝa vangeto, la rondan mentonon. Sed la tutan malhelan kaj longan hararon mi ne vidis. Ĉi estis kaŝita sub la *jemino**) kaj la *jaŝmako***), nigra silka kovrilo, per kiu ŝi ĉirkaŭvolvis sin tiel simpatie. La delikataj korpoformoj montris konturojn kiel ĉe plej bela Eŭropanino.

Ĉi tion vidas nur la duonhela fenestroŝirm ta ĉambreto, la maljuna patrino kaj la banistino, la spritema maljunulino Fatma.

Kaj kion ne scias pri ŝi tiu ĉi maljunulino? — Ŝi, Fatma la maljuna, rakontas al ŝi ĉion, kaj ŝi, la junulino Nadzi, malkaŝas antaŭ ŝi sian junan freŝan koron.

Kaj la okuloj de Nadzi ŝajnas kvazaŭ malvarmaj karboj, sed ili flamas kiel ruĝa granda fajro. Ili brulas pro pasio kaj entuziasmo, pro duobla amo: de amo al ŝia fianĉo, ŝia amato, kaj de amo al ŝia kara patrujo. Kaj tiu ĉi duobla amo igis ŝin heroino.

Ĉu estas eble al ŝi, toleri tion, ke ŝia amato, Rifato, restu vundita sur la militkampoj ĉe Ĉatalĝa, sen helpo? Ke li, gardu lin Alah, falu en la manojn de la bulgaroj? — Ne, milfoje ne!

Ĉu estas eble al ŝi, toleri tion, ke la senkora malamikaro atingu la belegan urbon Stambulon, ĉe la bordoj de la klarakva Bosporo, al

kies ondoj ŝi permesas karesi kaj kisi sian ĉarman, blankan korpon, somere, kiam ŝi banas sin tie, ĉe sia bela *jali*?) — Ne, milfoje ne!

Ŝia fianĉo, Rifato, belega altkreska junulo, foriris en la militon kiel memvolulo, por batali kontraŭ la Balkananoj. Per ĉi tio li plenumis la volon de sia kara patrolando kaj de sia amata Nadzi. Kaj ŝi, Nadzi, varme adiaŭis sian fianĉon; ne unu fojon nur malsekiĝis ŝiaj plenaj rondaj vangetoj kaj la skarlataj lipetoj de varmegaj, flamaj kisoj. Ankaŭ ne unu fojon nur malsekiĝis la bela vizaĝo de Rifato de larmoj, kiuj fluegis el la grandaj, malhelaj kaj fajraj okuloj de Nadzi...

Poste ŝi enŝlosis sin kun la maljuna Fatma en sia duonhela ĉambreto kun la ŝirmitaj fenestroj. Sed ĉi tiun fojon ne por bani sin.

Malestime ŝi forigis la nigran silkan *ŝarsafon***), forŝiris de l' kapo la *jaŝmakon*, kaj maro, nigra-silkeca maro da haroj verŝiĝis sur ŝian korpon. Ŝi malfermis kofron, elprenis tondilon kaj etendis ĝin al Fatma. — Jen, Fatma, — ŝi diris, — prenu la tondilon kaj... malaperigu mian hararon!...

La maljunulino restis kvazaŭ ŝtonigita. Ĉu estas eble, fortondi tian ĉarman silkan hararon? *Fanus efendi* — ĝemis la maljuna Fatma, kaj ŝiaj etaj okuloj pleniĝis je larmoj, — pro kio forigi ĉi tiun belegan silkecan hararon, kiun mi flegadis tiom multe da jaroj? Pro kio?

— Ne demandu, Fatma, kaj faru laŭ mia deziro... Ne, ne mi, sed la patrujo postulas ĉi tion.

— La patrolando postulas cian hararon? Pro kio? Ĉu por vendi ĝin kaj fordoni la monon al „komitato“? Fordonu do pli bone cian ŝparitan monon, kaj la karan hararon restigu ĉe ci!

— La ŝparmonon mi jam fordonis al mia fianĉo, kiu per ĝi aĉetis soldatan uniformon, belan pafilon kaj fieran ĉevalidon, kaj kiu nuntempe batalas en Ĉatalĝa. La hararon mi ne vendos, ci kaŝos ĝin: ĝi estas al mi superflua...

— Superflua? la hararo, la silkeca, nigra, la longa franĝaro! Ci forigos ĝin? Ho, kiel oni admiradis cin!

— Kiu?... Ĉu mi montris al iu miajn harojn?...

— Patrino cia, mi...

— La patrino kaj ci, Fatma, admiros min ankaŭ sen la hararo...

— Kaj cia fianĉo?... Rifato?...

— Rifato admiros min ĉe Ĉatalĝa...

Kaj Nadzi rakontis al la maljunulino, ke ŝi forsendis Rifaton al la batalkampo por batali kontraŭ la bulgaroj, serboj kaj grekoj, kaj ke ankaŭ ŝi intencas foriri tien, por kuraci sian

*) turka kaptuko

***) tulo por la vizaĝo

*) Konstruaĵo ĉe marbordo

***) Turka virina supervesto

Rifaton, se li estos vundita, kaj aliajn otomanajn soldatojn. Ho, se ŝi povus preni en la manon pafilon, glavon, ŝi forflugus tien, kie ŝiaj fratoj batalas kontraŭ la balkana malamikaro kaj krius al ĝi: „Mi estas fratino de tiuj, kiujn vi senhonorigis tiel barbare, turmentis kaj mortigis. Mi volas venĝi al vi pro la senkulpe verŝita sango“. Kaj ŝi batus tiam dekstren kaj maldekstren, ĝis kiam ŝi sukcesus forpeli la malamikaron, aŭ malsekiĝinta de sango de la malamikoj ŝi estus trafata de la morto sur la militkampoj. Kaj tiam algalopus Rifato sur sia ruĝa fiero ĉevalo, prenis ŝin en siajn fortajn brakojn kaj entombigus ŝin kun flamega amo kaj maro da maldolĉaj larmoj en la tero de la savita patrujo, tie, ĉe la belega Bosporo, kies kuraĝaj ondoj glatigis kaj kisis somere ŝian laktecan blankan korpon...

Ho, Fatma! Kiel ĉarme estas, ricevi tian heroecon dolĉan morton!

Fatma ne respondas, ŝi ĝemas kaj ploras.

— Ne timu, mia kara maljuna Fatma, mi ne batalos, ĉar, bedaŭrindege, mi ne instruis min en tio, ankaŭ miaj fortoj por tio ne sufiĉas, ĉar kiom aĝa mi estas? Ŝajnas, ne pli ol 17 jara. Sed pri aliaj aferoj mi estas instruita kaj per tio mi povos esti utila al mia patrujo kaj al mia fianĉo. Ne vane mi pasigis du jarojn en la medicina fakultato! Mi ekiros flegi la vunditajn filojn, batalantajn por sia patrolando, por redoni al ili la perditajn fortojn, por ke ili povu daŭre batali...

Prenu, Fatma, la tondilon kaj fortranĉu miajn harojn. Ili malhelpos min, mi volas, ke neniuj sciu, ke virino venis en la batalantaron, nur Rifato scios pri tio, kaj ankoraŭ pli kuraĝe li batalos. Rapide, Fatma, flugas la horoj. Ĉu ĉi ne aŭdas, kiel tondras la pafilegoj?...

*Alah-hu-i-akbar**) — ĝemas Fatma; ŝi levas alten la okulojn kaj komencas tondi. Kaj ĉe ĉiu harbukedo, kiun ŝi fortranĉas, elŝiriĝas el ŝia enfalinta brusto profunda ĝemo, kaj la malsekaj lipoj eligas la vortojn: *Alah-hu-i-akbar!* Kaj ĉe ĉiu harfasko, forigita de la ĉarma kapeto, brilas, brilegas la grandaj nigraj okuloj de la juna *Hanus efendi*. Ili brilas pro amo al patrujo, brilegas pro amo al ŝia fianĉo kaj flamas de venĝopasio kontraŭ la malamikaro. Kaj ĉe ĉiu fortranĉita harfranĝo, kiun la maljunulino enmetas zorgeme en la kofron, levigas kaj bruas la junulina plena brusto, kaj la perlaĵ dentaroj eligas la vortojn: Estas pro la patrujo, pro Rifato!...

Kaj ŝi elprenas el la kofro virajn vestaĵojn, — estas la civilvesto de ŝia frato Kiamil, juna oficiro belforma kaj altkreska, kiel ŝi, kiu falis dum sangeca batalo ĉe Lule-Burnas, kaj ŝiaj ĉarmaj okuloj malsekiĝas de larmoj. Poste ili brilas, brilegas kaj flamas, kiel antaŭe.

— Venĝon! Venĝi al la kruelaj malamikoj la sangon de sia malfeliĉa frato, — ĉi tion faros Rifato.

Kaj en la vesto de sia frato, kun ruĝa fezo sur la tondita kapo, ŝi ĵetas sin en la brakojn de sia maljuna patrino, de sia bona Fatma.

* * *

Hura! Hura! Ho, kiel tondras la pafilegoj, kiel bruegas kugloj super ŝia kapo! Vunditaj soldatoj kovras la batalkampon. Nadzi klopodas pri ili, vigligas ilin, tiras ilin en siaj delikataj, molaj brakoj al la hospitala tendo. Ŝiaj fortoj kreskas, ŝi ne laciĝas. En la virvesto ŝi ricevis virajn fortojn. Kaj ŝia kuraĝo, ho, kiel granda ĝi estas! Ne timigas ŝin la kugloj de la pafilegoj, ŝi volas nur helpi, ŝi deziras vidi, kiel Rifato batalas kaj kiel falas kaj forkuras la bulgaroj. Rifato batalas tie kun granda kuraĝo kaj galopas sur sia ruĝa kaj fiero ĉevalo. Kaj ŝi levas la blankan maneton, aligas du ĉarme delikatajn fingrojn al siaj ruĝaj lipetoj kaj direktas longan kison al la juna rajdanto. Kaj tiu, ŝajnas, ankoraŭ pli kuraĝiĝas kaj galopas ĉiam antaŭen, antaŭen...

Tie falas centoj da bulgaroj, forkuras la malamikaro, kaj ŝiaj marmoraj manoj aplaudas „brave“, kaj ŝiaj okuloj brilas, brilegas pro ĝojo, kaj ankaŭ ŝi paŝadas antaŭen...

Jen, iu ĝemas inter la mortantaj korpoj. Nadzi iras laŭ la direkto de la ĝemado. Bulgara soldato kuŝas etendita ĉe ŝiaj piedoj, kun fermitaj okuloj kaj buŝo duonfermita, el kiu eliĝas malfortaj ĝemoj, kaj de la dekstra brako torentas strio da varma sango. Nadzi kliniĝas, ĉirkaŭbendaĝas lian vundon kaj lavas lian vizaĝon. Subite ŝi levigas kaj per du flamaj okuloj ŝi rigardas la vunditon, kiu ree fermas la okulojn.

Ho! Kie estas ŝia longa silka hararo, kie estas la *ŝarŝafo*, ŝi montrus ilin al la bulgaro, por ke li vidu kaj sciu, ke ŝi estas fratino de tiuj senkulpaj malfortaj kreaĵoj, kiujn li kaj liaj fratoj tiel malnoble senhonorigis, turmentis kaj mortigis. Ke li vidu, sciu kaj tremu, li, la kruelulo, kaj tiam ŝi levus sian tranĉilon kaj enigus ĝin en la malamikan bruston, por venĝi la verŝitan sangon de la miloj el sia gefrataro.

Sed ne... Kaj Nadzi ekprenas la vunditon en siajn molajn brakojn kaj fortiras lin al la ambulanco kaj kuracas la mortiginton de siaj fratinoj...

Ne, la turkoj, la Azianoj, estas pli civilizitaj ol la Europanoj, la Balkananoj! La Azianoj, la turkoj, posedas... koron molan, homan koron...

El hebrea lingvo tradukis
S. Pŝenickij, Wolkowysk

*) Alah estas plej potenca!

Internacia konflikto

Preskaŭ ĉiutage oni povas legi en naciaj ĵurnaloj pri internaciaj konfliktoj.

Se iu ministro aŭ diplomato sentas kapdoloron, oni jam skribas pri danĝera situacio kaj pri internaciaj konfliktoj.

Aŭ se iu kapitalisto havas tro da pafilegoj kaj ĉiuspecaj mortigiloj en siaj magazenoj, li facile vendas tiujn ĉi abomenajn ilojn — kiujn li cetere plej multe timas — sub la malĝusta publikigo pri internaciaj konfliktoj.

Profitiga komercego! Nenio ja estas tiel facile vendebla, kiel la armiloj.

Nu, kaj la patriotismaj ĵurnaloj, ili ja devas skribi ion similan, alimaniere neniu ilin legus. Cetere niaj patriotoj bezonas ian ekscitilon; la paco ja ekdormigus ilin.

Sed ni havas ankoraŭ aliajn kaŭzojn, kiuj ekscitas sen grava motivo ofte tutan nacion.

Jen rakonto, kiel okazas en ordinara vivo.

En iu vilaĝo apud la landlimo renkontiĝas du bonaj amikoj. Ĉar ili jam multajn jarojn ne vidis unu la alian, la arda ĝojo vidiĝas sur ilia vizaĝo, kaj por povi (*pli bone!*) esprimi sian ĝojon, ili iras konkorde en la proksiman drinkejon.

Ili multe babilas kaj la alkoholo ĉiam pli kaj pli entuziasmigas ilin tiel, ke fine inter ambaŭ estiĝas malpaco, kaj la sekvo estas, ke ilia ĝojo finiĝas per interŝanĝo de kelkaj vangofrapoj.

La afero ne estus tiel grava, ĉar, laŭ sperto de ĉiuj gekamaradoj, io simila okazas ĉiutage en la tuta mondo, dank' al la efiko de l' alkoholo.

Sed en nia okazo ĉeestas kelkaj vilaĝanoj, kiuj rakontas la okazintaĵon hejme, kaj, por ke ĝi estu pli interesa, ili aldonas, ke fluis ankaŭ iom da sango.

La interesa okazintaĵo transportiĝas en la proksiman urbeton, kie oni jam parolas, ke unu estis grave vundata. Fine ĝin ankaŭ ekscias unu sentema patrioto, kiu post mikroskopa konsiderado de la afero malkovras, ke la du amikoj ne estis samnacionoj. Ho, estas atako kontraŭ nia nacio, kaj tuj li sendas longan artikolon al la loka patriota ĵurnalo kun la rimarko, ke lia kara samnaciono estis mortigata.

La redakcio, subtenata de kelkaj patriotaj kapitalistoj, afable akceptas la bonvenantan artikolon, kaj, ĉar pri unu homo la legantoj ne multe plorus, oni faras „preseraron“ kaj plimultigas la mortigiton.

La aliaj naciaj ĵurnaloj simple eltranĉas la artikolon, kaj sub diversaj titoloj ĝi aperas en la tuta lando.

Sed la patriotoj de la kontraŭa nacio ankaŭ zorgas pri bona informo de sia nacio kaj per siaj sensaciaj artikoloj superas la alian nacion.

Trovas sin iu sincerulo, kiu kontraŭstaras la malveraĵojn, sed oni silentigas lin per la vorto

„renegato“. La patriotaj ŝovinistoj ja volas ebligi „internacian konflikton“.

La du amikoj baldaŭ repaciĝas, sed la nacia malamo, kaŭzita de patriotisma ĵurnalaro, kreskas...

Al tiaj malbonaĵoj ni devas energie kontraŭstari, ĉar el malgranda kaŭzo fariĝas grava malbonaĵo.

Ĉiutage la senmezura drinkado de alkoholo kaŭzas milojn da malpacoj, ja eĉ mortigojn, sed tion multaj homoj konsideras kiel necesan malbonon, se ĝi okazas inter samnacionoj.

Sed ve, kiam kunpuŝiĝas du ebruloj el malsamaj nacioj, tiam eble naskiĝas internacia konflikto!

C. (El „Le Travailleur Esperantiste“)

Rivero

La sun' okcidenta per hela purpur'

Surverŝas bruantan arbaron . . .

La birdoj kantetas, — kun laŭta murmur'

Alfluas rivero la maron . . .

Purpuro ŝanĝiĝas je or-violet' —

Arbaro endormas revante —

Birdetoj silentas — kaj nur riveret'

Bruegas, murmuras konstante . . .

Noktiĝis . . . en dormo jam kuŝas natur' —

Silenta fariĝis la mondo —

Nur en la rivero kun plora murmur'

Al mar' fluas ondo post ondo . . .

Juliusz Kriss, Kraków

(El „Agordoj noktaj“)

Aforismoj

La amikeco estas sento, kiu varmigas ne bruligante.

*

La amo estas duobla egoismo.

*

La amo estas doloro, de kiu oni ne volas resaniĝi.

*

La amo estas profundaĵo, en kiun oni sin ĵetas volonte.

*

Regulo sen ekzemplo estas skeleto.

*

Se oni ne havas tion, kion oni amas, oni devas ami tion, kion oni havas.

*

La sentemo estas ĉiela donaco, kiu utilas multigi niajn dolorojn kaj ĝojojn.

*

Sofio Motard

Diversaj komunikoj

Sciigo pri la Esperantista Literatura Asocio

Ankaŭ E. L. A. suferas per la komuna sorto. La pretegitaj kunvenoj ne povis okazi, la bela albumo kun la portretoj de la anoj sin ankoraŭ trovas en Parizo. Ĉar E. L. A. internacie laboras, ĝia agado nun ĉesis. Anstataŭ legi kaj forsendi manuskriptojn, la administracio nun laboras por la „Ruĝa Kruco“. Ĝi tamen ion faris. Ĝi sendigis la broŝuron: „La vero pri la milito“ al 40 anoj en neŭtralaj landoj, por ke ili helpu je la disvastigo de la vero. Ni ripetas ĉi tie nian peton, ke ili traduku la gravajn al ili senditajn dokumentojn en siajn naciajn lingvojn kaj ke ili publikigu tiajn artikolojn en siaj gazetoj. Ĉiuj anoj de E. L. A. helpu energie ekscii kaj disvastigi la veron, tio estos granda komuna servo. Gazetojn, kiuj akceptis iliajn artikolojn, ili bonvolu sendi al

Dresden-A., Nicolaistr. 18

Por lertuloj

Enigmoj kaj problemoj

No. 25

- * a * o metalo
- * l * n o ilo de ŝuisto
- * a * e n o marbesto
- * r * n e o insekto
- * a * o l o tutaĵo de substanceroj
- * d * c i o aritmetika procedo
- * i * r e o vesto
- * z * n o polimero de l' oksigeno

Kompletigu la suprajn vorterojn, anstataŭigante la stelojn per la ĝustaj literoj. Ĉi tiuj, legotaj en ambaŭ vicoj de supre al malsupre, nomos verkon de Charles Dickens.

Majo

No. 26

La unua estas pronomo, la dua estas sufikso, kaj la tuto tropika planto.

M. Doura

No. 27

La kvanton, tempon kaj longecon mi mezuras, Se la literojn miajn ĝuste vi ordigas.

Arntz

En la venonta numero de eldono B ni publikigos la solvojn de la ĉi-supraj problemoj. La divenintoj bonvolu sendi la solvojn, skribitajn nur sur poŝtkarto sen iu alia komunikoj, ĝis la 10a de l' venonta monato al nia redakcio en Dresden-A. I, Struvestr. 40. — Tri el la solvintoj ricevos libropremion, kiun ili povos elekti el la katalogo de nia eldonejo. (Valoro de ĉiu premio ĝis 1 Sm.).

La gajntoj bonvolu sciigi al nia eldonejo, Ader & Borel G. m. b. H., Dresden-A. 1, Struvestr. 40, la librojn, de ili deziratajn. —

Nia provizo de taŭgaj enigmoj kaj problemoj estas preskaŭ elĉerpita. Volonte ni akceptas novajn kaj kun kora antaŭdanko petas pri alsendo.

Solvoj el la antaŭa kajero

No. 22

```

      a
     a v o
    k r e m o
   b u r n u s o
  k a r r i o f i l o
  
```

No. 23

kakto — kato (ankaŭ musko — muso).

No. 24

Zoologo, aligato, mevo, ebono, naso, haringo, opalo, favo.

Zamenhof — Varsovio.

Ĝustajn solvojn sendis

de ĉiuj numeroj: F-ino Käthe Bock, Neukölln; Max Butin, Godesberg; Max Fischer, fervojasistanto, Weida; S-ino Marie v. Ganahl, Kufstein (Tirolo); Otto Hempel, pastro, Lobstädt; Th. Kempe, Radebeul; Lammers, Oldenburg; T. Löttsch, Buchholz; E. Momber, Honnef; M. Schäfer, Dresden; Rechnungsrat Edm. Schulz, Ueberlingen; E. Ulitzsch, Gera; kolonelo F. Zwach, Wien; D. J. Broekhuizen, s' Gravenhage; Walter Lippmann, Leipzig; Dro Müller, Nordhausen; F-ino M. Jaquel, Mülhausen (Els.); S-ino Amtsgerichtsrat Große, Wolkenstein i. Sa.

La premiojn gajnis per loto: F-ino Käthe Bock, Neukölln; S-ino Marie v. Ganahl, Kufstein; S-ro Th. Kempe, Radebeul.

Korekto

En la antaŭa kajero (Nroj 8—10, paĝo 21) ni publikigis skizon *El la vivo en Rusa Polujo*, sub kiun ni erare metis la nomon de S-ro R. Maske. Ni devas sciigi al niaj legantoj, ke S-ro Maske ne estas la verkinto de la artikolo, kiu devenas el la Krakówa gazeto „Czas“. La eraro naskiĝis per tio, ke samideano, kiu sendis al ni la tradukon, nomis S-ron Maske kiel verkinton.

La redakcio

La proksima numero aperos
la 20an de Decembro!